



Recenzoj

Jean Rostand. La nuna stato de l' evoluismo. 14 × 20 cm, kartona kovrilo; 114 pĝ; prezo fr.fr. 250 (kart.), 300 (bind.).: eld. SAT, Parizo, Kontro-lita de la Literatura Komitato.

Tre klara, senpartia k freŝinformita prezentado de la diversaj formoj (Iamarkismo, darvinismo ktp) de la evoluismo teorio, de la problemoj, kiujn ĝi lasas ankoraŭ neklarigitaj, k de la hodiaŭaj hipotezoj pri la origino de homo. Jean Rostand (filo de la fama poeto Edmundo Rostand) estas unu el la plej konataj popularigistoj pri scienco en Francio, k, krom tio, mem sciencisto k eksperimentisto. La resumo de tiu tre grava teorio, de ĝia malvolviĝo k de ĝiaj sekvoj estas tiel bone farita, vigla k preciza, ke ĝi tre certe interesus ĉiun leganton. Liaj konkludoj pri la estonteco de nia raso estas ja pesimismaj; pli optimisman perspektivon liveras la verko de alia franca sciencisto Leconte du Nouy, „Homo k lia destino“, kiu ankaŭ meritis tradukiĝon.

La lingvo de la traduko estas korekta, krom du tri lokoj: p. 10 „enkondukata en la fakultatoj de Giard“ (= enkondukita de Giard en la fakultatojn); p. 25, absoluta partecipo; p. 49 „neniam vivulpnado ne estigas antaŭ ni...“ (= neniam la penado de viva estaĵo produktis antaŭ ni); p. 100 „ne ankoraŭ“ (= ankoraŭ ne). Sed la stilo estas difektita de tro da francismoj: p. 9 k 38, noto: „Revo de d' Alambert“ (= Songo); p. 15 „komparita anatomo“ (= kompara); p. 79 „centfoje pli penetremaj“ (= centoble); p. 80 k 84 „atesti“, „ateste voki“ (= konsideri); p. 81 „Goldsmidt estus ricevinta multnombrajn ŝanĝigojn“. (G. laŭdire ricevis grandnombrajn...); p. 103 „abato Breuil“ (= pastro B.); p. 104 „skulpti en eburo“ (= el); ktp.

La du latinaj citaĵoj estas erare tradukitaj, p. 56 „in mutua funera“ per „en solidara funebro“ (= por reciprokaj murdoj), k p. 99 „Faber“ per „laborema“ (= manlaboristo). Ĉu ankaŭ al la franca influo oni ŝuldas la eksterordinaran, nervincitan interpunkcion, kiu iafaje eĉ malkomprenigas frazon (p. 12: „Tiaj estas la tre malgrandaj membroj kiujn kaŝas sub sia haŭto, la serpento pitono“)? — Sed pli ol ĉio alia estas bedaŭrinda la uzo de esperantismaj anstataŭ internaciaj formoj, tiel klarege preferindaj en scienca verko. Tra la tuta libro oni renkontas ekz-e la vorton „ŝanĝiĝismo“; nu, tiu formo estas ne nur malbela, ne nur nepreciza, sed eĉ rekte malĝusta, ĉar ĝi povas signifiri nur „transformismo“, kaj tute ne la teorion, laŭ kiu la evoluo estiĝis per abruptaj ŝanĝigoj, kion ĉiuj specialistoj nomas „mutaciismo“. Kiu leganto, se li antaŭe ne legis la francan verkon, rekonos nur „ŝanĝigaj estigiloj“ la konatajn „mutaciajn geojn“? Same oni tradukas konatan titolon de Le Dantec „Praulaj influoj“ anstataŭ la klara „Atavismaj influoj“; p. 51 „la multecaro de la ĝermo“, p. 71 „senpalphara felo“, p. 79 „(la alfa-radioj), eraj“, restis al mi ne kompreneblaj, probable el la sama kaŭzo. La tradukistoj konfuzis en sia transskribo la grekan „ch“ kun la franca: p. 101 „Akeŭlea“ (= Aĉeŭlea - fr. St Acheul), p. 100 „Kelea“ (= Ĉeŭlea - fr. Chelles), sed p. 113 „ŝasmogama“ (hismo- aŭ kasmogama, el la greka). La elekto de kelkaj sciencaj transskriboj estas malbona: p. 18 „ĉe la ekvidoj“ certe kaŭzos konfuzon ĉe multaj legantoj (Wüster registris ĝuste „ekvidoj“); p. 103 „Kromanoj“ misformas la nomon de la konata „Kro-Manĵona“ raso; p. 111 mi ne aprobas la noton „korektu en P.V. Afiso anst. Afido“ (ĉi lasta formo troviĝas ankaŭ ĉe Wüster, k estas konservita de Stop-Bowitz por la venonta eldono de P. V.); p. 112 „infuzulo“ estas „infuzorio“ en ĉiuj ĝisnunaĵ vortaroj. Mi principe aprobas la konservon de la nacia ortografio ĉe la modernaj nomoj k la asimilon de la antaŭnomoj: sed se oni skribas, p. 28 „Johano Perrin“, kial sur la titolo „Jean Rostand“? — Kompreneble, la ĉi-supraj kritikoj, kiujn mi en la intereso de la teknika lingvo ne povis ne fari, k kiujn cetere la helpo de kompetenta sciencisto estus evitinta, nenion deprenas de la merito de la tradukintoj, kiuj atakis malfacilegan taskon, k de la havigado de tiu facile legebla k fruktodone pensiga verko.

G. Waringhien.

Universala Esperanto-Asocio, Jarlibro 1950, dua parto. 48 pĝ. form. 11,5 × 14. Nur por membroj. Entenas finparton de marista terminaro k jarraporton de la UEA-estraro.

Leteroj de E. Lanti.

Tiu ĉi verko havis la malfeliĉon presigi nur post milit-eksplodo. Ankaŭ la recenzoj, kiuj aperis tiutempe en la gazetaro, trafis tre malgrandan publikon; tamen vere diskoniginda ŝajnas al ni tiu ĉi recenzo kiu aperis en „The British Esperantist“ de junio-julio 1940 (do en tempo, kiam tiu gazeto trafis nur anglalingvan publikon). — Red.

Jen bonstile prezentita k bele presita kolekto de 60 leteroj skribitaj de la fondinto de S.A.T. Ili traktas la plej diversajn temojn (lingvaj demandoj, etiko, religio, budaismo, filozofio, politiko, marksismo, bolŝevismo, faŝismo, sennaciismo, polico, japanaj virinoj, judismo, impresoj pri Japanujo, Hispanujo, Aŭstralio); k venas el plej diversaj lokoj (Lisbono, Narvik, Sydney, Osaka, Madrido.....). La aŭtoro esprimas siajn pensojn libere k interese. Ĉu oni aprobas aŭ malkonsentas liajn dirojn — li fieras nomiĝi herezulo — oni devas konsenti, ke ili estas pensinstigaj k legindaj.

Troviĝas kelke da neortodoksaj lingvaj, jam ofte prinotitaj; ili tamen, estas la peko de spertulo — pardoneblaj kvankam evitindaj. Ekster tio, lia stilo estas klara, flua, k ĉiel admirinda: li skribas kiel Esperantujo uzanta gepatran lingvon. Tiu flueco sendube fontas el la fakto, ke Esperanto estas por li lingvo hejma, kiun li plene majstras, k uzadas en la vivo ĉiutage.

Pri la enhavo ni ne parolos. Jen tamen unu frazo (p. 269): La tuta mondo ja frenezigas. Sed vi konsideru, ke se saĝa homo ial devas vivi en frenezulejo, tio ne signifas, ke li ankaŭ konduku tie kiel frenezulo.

Ornamas la verkon kelke de interesaj bildoj, inter kiuj du portretoj de la aŭtoro: unu kun la konata k respektinda barbo, kiu donas al li aspekton patriarkan k amegindan — eĉ apostolan; la dua sen la barbo (kiun oni fortendis por negrava operacio), en kiu li ne plu estas rekonebla. Ikabod! La barbo nepre rekresku!

Kiu ŝatis la verkon Vortoj de Lanti, tiu trovos en la nuna volumo grandan ĝuon. Bedaŭrinde, ĝi estas neakirebla nunmomente.

K. Golding.

Hodiaŭ vi akirus ĝin ĉe SAT por prezo de 1,20 dol. (minus devalua reduktio). Ni honoru la memoron de k-do Lanti, studante liajn verkojn.



LIBERPENSULA ANGULO

La kvina k la sesa taĉmentoj.

En la gazetoj oni legas aŭ per radio aŭdas nuntempe ofte pri la kvina taĉmento. Per tio oni indikas la komunistajn kernojn, kiuj troviĝas en la landoj ekster la soveta sfero k kiuj post la unua mondmilito klopodis penetri en la vicojn de aliaj organizoj, por tie kapti la potencon. Ankaŭ nun ili estas tre agemaj, k laŭ la bruo kiun faras iliaj kontraŭuloj, tiuj lastaj ŝajnas esti tre timigitaj.

Kion vi verŝajne ne scias, tio estas ke ekzistas ankaŭ sesa taĉmento; ja pri ĝi eĉ ne per unu vorto la samaj publikajoj parolas, kvankam ili certe ne estas malpli dange-raj por la paco en nia mondparto ol la 5-a. La naskiĝejo de la kvina taĉmento estas Sovetio, tiu de la sesa estas Romo; la membroj de la kvina estas konataj al ni kiel komunistoj, tiuj de la sesa kiel humanistoj. Antaŭ la dua milito ni neniam aŭdis ĉi lastan nomon, hodiaŭ oni fanfaronas pro ĝi de la tegmentoj.

Se mi ne eraras, la kanadaj liberigintoj, kiuj estas tre piaj infanoj de la papo, importis tiun malsanon trans la limojn de Nederlando al Francio, samtempe kun la kolorado-skaraboj.

Post la unua mondmilito la komunistoj klopodis penetri en la haŭtojn de la liberpensuloj k de la esperantistoj, kion Hoving malhelpis por la unua organizo k nia k-do Lanti, finsolve dum la amsterdama kongreso en 1931, por la dua.

Post la dua mondmilito la humanistoj aplikis la saman metodon kontraŭ nian liberpensulan organizon, kiel la komunistoj antaŭe. Ni alterne kunvenis ĉiun duan dimanĉon. Post la unua milito tia kunveno kun cent partoprenantoj estis sukceso, sed post la dua, salono por ses cent personoj ne estas sufiĉe granda. Tio vekis timon pro ia nekonata danĝero; mi avertis pri tio la estraron, sed ĉi tiu pri-ridis mian suspektemon. Kelkajn monatojn poste la humanistaj voĉoj dum la balotoj regis en niaj liberpensulaj vicoj! De tiam ili mastrumas ankaŭ nian gazeton „de Vrijdenker“ k ĝin uzas por prediki sian tezon „pri toleremo“, por sciencaj artikoloj, filozofiaj meditoj k eĉ sensencaj romanoj, sed verajn liberpensulajn artikolojn ili ne allasas. La humanistoj nun aŭdigas sin per radio ĉiudimanĉe matene je ondlongo de 298 metroj, dum la liberpensula radi-organizo vane dum jaroj klopodas reakiri similan permeson. Tio laŭ mia opinio klare montras la hipokritan karakteron de tiu movado. Vi demandas, ĉu ilia rolo vere nur konsistas en tio malebligi la aperon de liberpensulaj artikoloj en „de Vrijdenker“. Certe ne: ili ankaŭ organizas somer-kampejojn por ĉiuj, kiuj ne plu partoprenas en religiaj organizoj, k ĉiu estas bona-vena tie. Ĉu ne laŭdirde?

Nu, tie kaŝigas viperon en la herbo! Enskribiĝante al tia somer-kampejo vi publikigas vian nomon, kiel renegato de la kristana religio, k tio estas mortkrimo laŭ la romkatolika eklezio. Ripensu, ke dum la hispana milito Romo utiligis la helpon de la aviadiloj hitleraj k musoliniaj por venki tiun malfeliĉan popolon! ke dum la dua mondmilito Hitler ekstermis grandan parton de la juda popolo, la plej bone organizita konkuranto de la roma potenco. Multaj militkrimuloj (nederl.) rifuĝis kun pastra helpo al Hispanio, k tie restadas. Okaze de tria milito Romo certe ne hezitos ilin resendi al sia patrio, kun ordono ekstermi la plej gravan malamikon, laŭ la listo de la humanistoj..... Homo avertita havas duoblan valoron; do zorgu, ke via tranĉilo estu akra, ĉar en tio mi konsentas kun la bibliaj vortoj, ke „estas pli feliĉige doni ol ricevi“, k se oni estas devigata elekti inter du malbonoj, tiam laŭ mi estas pli inde esti ekzekutisto ol ŝafo buĉota.

Ariadno.

PACISTA FRAKCIO

Jarraporto (fino). Anoniman subskribon por miaj artikoloj en S-ulo mi adoptis intence, instige al komuna (kollektiva), do anonima kunlaborado de la k-do, plej dezirinda por la bono de nia agado. Efektive nia Frakcio laŭstatute celas esplori la demandojn pri Paco, informi per dokumentoj pri ĝi la anojn, por ke ili kapablu efike kontraŭbatali la militon. Nu, por tiu laboro necesas informitoj, kleruloj, k por laborplani — helpo de sindonaj spertuloj, ĉies sugestoj.....

Tial al vi, pacamikoj, denove mi turnas min kun insista peto; laŭeble tuj anoncu vin por kunhelpo al nia P. F.-sekretario. Tiun helpon esperante, vin paciste salutas k antaŭdankas ROFO.